1 1926 Esperanto

REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

FONDITA en 1908 - TRIA SERIO

31-a Jaro - N° 220 - Aug. Sep. 1963

34, Rue de Chabrol. Paris X° — Métro : Gare de l'Est ou Poissonnière — Tél. : PRO. 55-03.

SOFIA

Avec ses 3.500 participants, le 48-ème Congrès Universel d'Esperanto qui a eu lieu à SOFIA du 3 au 10 août dernier, prend place parmi les plus importants congrès.

Si, chaque année, on retrouve les éléments fondamentaux du programme - l'ambiance est cependant chaque fois différente. La douceur du climat, le soleil, l'amabilité des bulgares, tout cela apportait au congrès une note particulière.

Les bâtiments spacieux de l' Université de Sofia avaient été mis à notre disposition et les différentes réunions ou conférences se tenaient dans des salles suffisamment vastes pour contenir les auditoires.

Par contre, on pourra peut - être regretter l' exigüité du hall où se trouvaient rassemblés les différents services: Caisse, excursions, poste, librairie, banque, etc...et qui rendait assez difficile la marche de ceux-ci.

On lira plus loin un compte-rendu détaillé des diverses manifestations de ce Congrès; mais il est utile de mentionner à part la séance d'ouverture qui s'est tenue dans la salle des conférences de "l'Universiade" (où pouvaient prendre place tous les Congressistes), en présence de M. G. TRAJKOV, premier vice - président du Conseil des Ministres de la République populaire de Bulgarie, qui s'adressa (en bulgare, traduction de M. Aleksiev) au congrès et à qui M. WENSING, vice - président de U. E.A. répondit.

C'est également à l'Universiade qu'eurent lieu la réception offerte par le Maire de SOFIA, le bal (tandis que le banquet se tenait dans les salons de l' Hôtel Balkan), la soirée artistique bulgare, la soirée internationale et la séance de clôture.

Le Congrès, enfin, a fait l'objet de nombreux compte - rendus dans la presse bulgare, à la radio de Sofia et de Varsovie. Le Correspondant à Belgrade du "Figaro" s'était rendu à Sofia où il a interviewé plusieurs membres du mouvement français notamment. Son article a paru dans le n° du 12 août 1963.

Une nouvelle pierre a été posée sur la route qui mène au succès de l'ESPERANTO "Langue Internationale".

FRANCA ESPERANTISTO
REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

SECRETARIAT : Mlle Y. PAULIER - Le secrétariat est ouvert tous les jours de 9 h à 12h et de 14 h à 18 h.(sauf dimanches et mardis). Pour toute réponse, joindre un timbre ou une enveloppe timbrée à votre adresse. Pour tout envoi d'argent précisez soigneusement la destination des sommes envoyées sur le talon du mandat.

REDACTION : M. Jean THIERRY UEF 34 rue de Chabrol - PARIS (10ème) .
Téléphone : PRO. 55-03

Tous les articles et communiqués ne peuvent être insérés qu'aux conditions suivantes : être toujours dactylographiés sur un seul côté de la feuille, avec une marge pour faciliter la lecture et la correction (double interligne). **Tous les articles ne se conformant pas à ces conditions seront refusés par la rédaction.**

COTISATIONS : Le détail en a paru dans le précédent numéro.

xxxx

Krome du aliaj kunvenoj okazis mardon matene kaj posttagmeze. Partoprenis 40 Komitatanoj sub la prezido de S-ro H.W.HOLMES en la diskutoj pri la raportoj submetitaj de la dumkongresaj komisionoj.

La ĝeneralaj kunvenoj de U. E. A. okazis lundon matene kaj vendredon posttagmeze. En la unua, sub prezido de S-ro WENSING viciĝis salutoj de fakaj organizaĵoj. S-ro GUNTHER prezidanto de T.E.J.O. gvidis la duan parton, kiu estis dediĉita al "la Internacia Lingvo Esperanto kaj la nuntempa Junularo". Oni substrekis la gravan signifon de la Junulara Revuo "KONTAKTO", kies rolo estos grava por la alproksimiĝo de la gejunuloj en ĉiuj landoj.
La dua kunveno aŭdis la raportojn de la Estraro kaj de la fakaj asocioj.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO - La unua prelego estis farita de Dro SADLER:Ĉu kulturoj aŭ Kulturo?"
La preleganto sin demandis: ĉu la alcelado al interkompreno kaj kulturaj interŝanĝoj ne rezultigos fine, ke la naciaj kulturoj, iom post iom, similiĝos unu al alia, tiel ke restos fine nur senkaraktera unuformeco Sed kiel interrasa pariĝo ne produktas idojn, kiuj estas unuforme mezaj laŭ fizika karaktero, tiel ankaŭ sur kultura nivelo la kontaktoj povas rezultigi tutan aron da novaj valoroj.

Prof. WARINGHIEN parolis pri la "Ellaborado de Esperanto-Leksikologio". Li prezentis la historion de la esperantaj vortaroj, la precipajn karakterizojn de ili, la perspektivojn pri la estonteco kaj la pretigon de Plena Ilustrita Vortaro, ĝian celon kaj gvidlinion.

Ni nur menciu la prelegon de P-ro DINEKOV pri "Evoluo de la bulgara Literaturo" ĉar tre verŝajne ĝi aperos detale en "Nuntempa Bulgario".

"Metaforoj, kliŝoj, slango", jen pri kio parolis F-ino BOULTON. La metaforoj de la poetoj kaj la slango de la ne - poetoj - ŝi diris - ambaŭ indikas, ke la lingvo estas vere vivanta. Esperanto prezentas la samajn eblecojn por ambaŭ, kiel nacia lingvo."

Prof. S. DJOUDJIEFF prelegis pri "la muziko de la lingvo kaj la lingvo de la muziko", kaj pli aparte pri la principoj de la esperanta prozodio kaj la muzikeco de la Internacia Lingvo.

D-ro T. WOJCIK parolis pri la nova racia muziknotsistemo, kiun li inventis. Broŝuro eldonita de Pola Esperanto-Asocio entenas la principojn de tiu sistemo.

S-ro K. Minnaja legis la prelegon de C.C.GUGLIELMINETTI pri "Nekonataj Belaĵoj de la Dia Komedio", okaze de la apero de la esperanta traduko.

S-ro B. KOLKER prezentis la "rezultojn de permaŝina traduko el la rusa lingvo en Esperanton". Nun ekzistas du solvoj al la problemo de multlingveco: la Internacia Lingvo kaj la permaŝina traduko. Ambaŭ havas avantaĝojn kaj mankojn. La proponota solvo strebas kunigi la avantaĝojn kaj malpliigi la mankojn.

CSEH - SEMINARIO - 250 personoj ĉeestis la inaŭguron, kaj ĉiumatene S-ro Cseh instruis ilin per sia metodo. Je la fino, la seminario estis salutita en esperanto de la 5-jaraĝa Enĉo BRATOIEF, el Ruse. La helpanto de S-ro Cseh, D. IVANOV disdonis la premiojn al la partoprenintoj.

DISTRAĴOJ - Ili komencis per la Bulgara Arta Vespero, kiu konsistis el du partoj: klasika (operkantistoj prezentis altnivelajn verkojn de Bizet, Verdi, Rimski-Korsakov ktp..) kaj folklora. Sed en tiu lasta parto la kantoj superis la dancojn, kaj eĉ

ne unu teksto estis tradukita. Nur unu artisto trovis la solvon: imitante ĉiujn blekojn aŭ kriojn de la kort- kaj dombestoj, li uzis senvortan internacian lingvon! Sub tondra aplaŭdo, li devis aldoni eron al sia prezento.

La Internacia Arta Teatro prezentis en Sofio la jam en Harrogate kaj Kopenhago prezentitajn teatraĵojn, kompreneble kun la sama sukceso kion montris la aplaŭdoj de la aŭskultantoj. Ili estis "Malutilo de tabako", "La homa voĉo" kaj La Respektema P..
Ĉu oni povas esperi novan programon en Hago?

La Bulgara Esperanto Teatro prezntis la "Komedion de Eraroj" kiun ĝuis pli ol I200 personoj. Post la prezentado, sovetano gratulis la geaktorojn.

La Bankedo ne estis ankoraŭ finita kiam la Balo komenciĝis en la ega salono de la Universiado. La planko ne estis tre taŭga por danci, tamen kiam la orkestro ludis, la loko estis plena da gedancistoj, kiuj de tempo al tempo haltis por ĝui prezentadon de naciaj dancoj el Britujo Skotlando, Danlando. Estas tre bedaŭrinde, ke la ĉeestantaro ne aŭskultis kun sufiĉa atentemo kaj silento la monologon diritan de Flego: "Anaso". Nur tiuj, kiuj estis apud la scenejo povis aŭdi lin!

Junulara Vespero okazis en la salonoj de Hotelo Balkan, kiun partoprenis 600 gejunuloj. La programo enhavis dancadon, amuzon, diversajn surprizojn, ktp...

La lastan tagon okazis Internacia Distra Vespero dum kiu oni prezentis klasikajn kantojn kaj operajn ariojn de itala kantĥoro - japanajn melodiojn en "Noo"-stilo (K.Deguĉi, flutisto, J.Umeda, planktamburisto).Oni ankaŭ aŭdis polan operkantistinon el Varsovio kaj aktoron el Moskvo kiu

N I A K A R A V A N O

Dekono de la kongresanoj estis el Francujo; kaj preskaŭ dekono el ili partoprenis en nia karavano per aŭtobuso al Sofio, tra naŭ diversaj landoj.

Survoje, ni haltis unue en Dijon, kie ni renkontis la tieran delegiton, S-ron CUGNY, kiu tagmanĝis kune kun ni, kaj kaptis tiun okazon por aperigi artikolon en la loka gazetaro kun la ĉi suba kliŝo.

(kliŝo "Le Bien Public - Dijon)

=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x=x

prezentis kelkajn recitaĵojn.Post la paŭzo, I. A. T. ludis unuaktaĵon (en traduko de S. FLEGO) "Vilhelmo la Konkeranto".

INFANA KONGRESO - La inaŭguro de la 8-a Internacia Infana Kongreso okazis sabaton la 3-an de aŭgusto. 60 infanoj el 10 landoj ĝin partoprenis. Dum la tuta semajno, ili preparis la programon kaj vendredon, prezentis ĝin al la gepatroj. Ĵaŭde ili ekskursis al Vitoŝa-monto, kie oni ĝuas belegan panoramon super la urbo Sofio.

-- o --

Krom tio, okazis la kutimaj kunvenoj de la fakaj asocioj. Pri ili, oni povos legi raportojn kaj komentojn en la apartaj revuoj aŭ bultenoj eldonitaj de tiuj asocioj.

Poste ni haltis en AIGLE (Svisujo) kie atendis nin la ĝenerala sekretario de U.F.E. Sro GUILLAUME,en PADOVA, LJUBJLANA (kie ni renkontis la verkiston D. V. SVETINOV, aùtoro de "Krioj el Mallumo", kiu disvendis tiun libreton je la profito de la viktimoj de SKOPJE), BEOGRADO kaj fine SOFIO, kien bedaùrinde ni alvenis dum la nokto.

Tamen dank'al la afableco de pluraj bulgaroj, antaù la tria matene ĉiuj karavananoj estis en sia lito!

Reirveturante, ni unue vizitis la malnovan ĉefurbon de Bulgario, TARNOVO, malgraù la pluvo kaj sub la gvidado de loka samideano.

Je la rumana limo, ni havis oficialan gvidistinon, kiu vizitigis al ni la ĉefurbon BUKARESTO, dimanĉon matene. Post libera posttagmezo dum kiu preskaù ĉiuj ripozis, ni ĉeestis vespere folkloran programon okazintan en arbara restoracio.
Survoje al BUDAPESTO, ni ankoraù tranoktis en Rumanujo, en la hungarstila urbeto TIRGU - MUREŜ, kie nia alveno per aùtobuso vekis grandegan intereson ĉe la enloĝantoj!

Ĉe la hungara limo, ni trovis denove oficialan gvidistinon, kiu kondukis nin unue al EGER kie ni estis interalie regalitaj per ses diversaj hungaraj vinoj, sed po unu glaso..

Denove pluvis kiam ni vizitis BUDAPESTON, sed tamen ni konservas bonan impreson de tiu urbego.

En VIENO, ni vizitis kompreneble la INTERNACIAN ESPERANTO - MUZEON, kiun malfermis speciale por ni S-ro STEINER kaj lia helpanto kaj posteulo. Tie, ni renkontis alian samideanon, Sron MUDRAK, kiu restis je nia dispono la tutan tagon, kaj kun kiu ni vizitis la kastelon Belvédère, Schönbrunn, Grinzing kaj Kalenberg; vespere, li kondukis nin al Prater - sed tie nur mallongtempe, ĉar denove pluvis!

Ni ankaù tranoktis en MUNKENO kie kelkaj el ni vizitis la famkonatan "Hofbräuhaus" kie okazis la interkona vespero de la kongreso en 1951!

En KARLSRUHE, ni alvenis tro malfrue por kontakti la tieajn esperantistojn; sed en NANCY, kie ni tagmanĝis la lastan tagon, ni havis la viziton de Ges-roj FONDRILLON.
Pri tiu tagmanĝo, ni dankas ankaù al S-ro COLNOT kiu helpis nin ĝin aranĝi antaù nia foriro el Parizo.

Fine, ni sendas nian plej koran dankon al tiuj, kiuj iamaniere helpis nin, tamen ne forgesante mencii S-ron CHEVERRY, kiu partoprenanto ĉiel helpis la respondeculon de nia karavano.

xooxooxooxooxooxooxooxooxooxooxooxoo

ROSARIA ESPERANTO LERNEJO dediĉita al la disvastigo de Esperanto en Argentino, ĉefe per koresponda kurso, bezonas librojn (ne gravas ĉu novajn ĉu uzitajn), gazetojn, ktp kaj kian ajn materialon por siaj Cirkulantaj Biblioteko kaj Ekspozicio. Nomoj kaj adresoj de Esperantistoj, kiuj volas korespondi kun argentinoj ĝi publikas senpage en sia monata revuo.
Adreso: Casilla de Correo n°278 ROSARIO (Argentino).
Antaùdankante vian helpon, kore salutas vin

Hugo A. LINGUA
Direktoro

xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==xx==

Sro Georgo HALASZ, V.K. Gyömol-u. I28 - BUDAPESTO (X) Hungarujo kolektas ĉasistinsignojn, kiujn la ĉasistos portas sur la ĉapelo, kontraù esperantaj revuoj, bildkartoj pri Budapesto, poŝtmarkoj, insignoj...

KIAM NI DUMVIVAS LA MONATOJN KIUJ ENHAVAS LA "R"
=:=:=:

bona stato, ili estis aljetitaj en la maron inter St - Christoly kaj Le Verdon.

Verâejne estas, ke la nombro de tiuj moluskoj atingis tiun de plurej centmiloj kaj aliparte nur malgranda parto de la ostroj tiel remetitaj en sian medion estis pereintaj.

Ĉiukaze, ĉar ili trovis tie aparte favorajn kondiĉojn por siaj kreskado kaj pluvivado, la saviĝintaj konsistigis naturajn ostreregojn kies abundeco daŭradis ĝis nun.

Ni rimarku, tie ĉi,ke la multnaskemo de ostroj lokitaj en plej taŭgaj kondiĉoj pri temperaturo kaj salenhavo de la akvo estas tia ke, por ekzemple, se en la Arcachon'e interna mareto oni ne forprenus ilin regule, ili tiel multiĝus, ke ili formus insulojn kaj obstrukcus la mareton.

Ni ĝoju pro tia multnaskemo, ĉar la nutraj ecoj de la ostroj estas rimarkindaj. Efektive, ostro feliĉe efikas al infanoj, junuletuloj, maljunuloj, kontraŭ vitaminmankaj malsanoj kaj tuberkulozo.

Sed ĉar ni konstatis la facilecon kun kiu ĝi multobliĝas, ni nun rigardu ĝian reproduktan sistemon.

Mi unue memorigos pri tio: Ostro solvis rimarkinde la seksan problemon. Ekzemple: la plata ostro, asertas la specialistoj, estas sinsekve ambaŭseksa, tio signifas ke ĝi estas alterne virseksa kaj inseksa. Je la komenco de la somero, ĝi ja estas ĉu vir- ĉu in-seksa sed kiam la generaj produktaĵoj estas maturiĝintaj kaj ellasitaj, la seksaj glandoj ekfunkcias laŭ mala maniero: la vir-seksaj iĝas inseksaj kaj reciproke. Oni tamen ne kredas, ke normale tiam estas memfekundiĝo.

Post tiu unua ellaso, novaj generaj produktaĵoj formiĝas, kiuj maturaj en aŭgusto kaj septembro, estos ellasitaj siavice en unu aŭ 2 fojoj.

Kiel ĉie aliloke, la naturo pri tri reproduktado montras sin eksterordinare maldomaĝema. Oni asertas ja ke el miliono da ovoj, oni ne povas esperi ke vivados pli ol deko da ostroj plenkreskaj.

La kaŭzo estas ke ĝenerale, ostro kiel mi jam diris ĉi supre, kreskas nur en medio kie temperaturo kaj salenhavo de la akvo ne superas difinitan maksimuman gradon nek atingas malsupran minimumon. Ĝenerale la ellaso de generaj produktaĵoj okazas kiam la eksteraj cirkonstancoj estas favoraj. Grandega kvanto da ovoj kaj spermatozoidoj, ellasitaj de la ostroj falas tiam al la fundo kaj estas fortrenitaj de la akvofluoj. Tiuj ĉi faciligas tiel la fekundigon Post 24 horoj, la fekundita ovo ŝanĝiĝas al larvo kun dekono da milimetro de diametro. Ĝi tiam estas ero de la planktono per kiu sin nutras multaj marbestoj.

Por ke ĝi povu pluvivadi necesas ke ĝi trovu multajn mikroskope malgrandajn algojn, sufiĉan kvanton da organika materio disvolvita en la akvo, kaj fine tre malgrandan kvanton da kupro. Ĉio tio ĉi troviĝas kun plej taŭga denseco de la akvo ĉe la enfluejo de riveroj.

Je la kvina tago, ĝi jam ekhavas konketon kun du tutsamaj valvoj. Je la dekdua, ĝiaj du valvoj malsamiĝas La ostro formiĝas, interne aliiĝas; ĝi post du aŭ tri semajnoj havas diametron je 3 dekonoj da milimetro. Kaj tiam, ĉar ĝi fariĝas pli kaj pli peza, ĝi falas sur la fundon.

Se ĝi havos favoran sorton, la akvofluoj ĝin transportos al taŭga portilo al kiu ĝi sin fiksos; se ne, ĝi estos forportata al marmezo kaj tiel estos neeviteble kondamnita ĉar tie multegaj malamikoj avide observatendas ĝin.

Ĝi havas siajn malsanojn kaj malbonajn sortojn, ekz. la borantaj algoj, iaj spongoj, iaj vermoj. Tiuj ĉi ne sin nutras per la korpo de la ostro sed traboras ĝian konkon sur

kiun ili lokas sin, tute same kiel ili farus sur ĉia alia kalka portilo kaj iom post iom, la ostro pleniĝas je koto, kaj mortas.

Sed ĝiaj veraj malamikoj, el kiuj homo estas sendube la plej malutilega, estas multaj, krom tiuj kiuj sin nutras per ĝia planktona larvo. Kiam ĝi estas fiksiĝinta, ĝi estas viktimojde la asteroidoj(marsteloj), marhelikoj, kankroj kaj iaj fiŝoj. La marstelo sin lokas sur la ostron kaj pere de la suĉiloj de siaj brakoj ĝi forte distiras la valvojn, kiujn ĝi disigas. Tiam ĝi almetas sian stomakon kaj ĝin enpuŝas inter la valvoj. La ostro estas tiam rapide englutata kaj digestata!

La boranta marheliko havas, kiel aliaj moluskoj, iun buŝan aparaton, la "radula" (france), kiu sub mikroskopo sin montras strio da akraj kaj malmolaj dentoj. La marheliko sin lokas sur la supran valvon kaj pere de sia "radula" uzata kiel fajlilo, ĝi fine post tri aŭ kvar horoj traboras la konkon. Tra la truo tiel borita ĝi sin nutras per la ostro.

La kankro, prefere, atakas la junajn ostrojn, kies konkon ĝi disrempas pere de siaj pinĉiloj kaj manĝas la malfeliĉan loĝanton. Kiam ĝi atakas la plenkreskulojn, ĝi rompas la randon, borante tiel fenestron tra kiu ĝi pasigas unu el siaj pinĉiloj, kaj elŝiras la ostron pecon post peco.

La agla rajo disrompas la konkon, eĉ la plej malmolan per siaj fortaj makzeloj; tio estas eĉ pli simple.

Eĉ la mituloj malutilas al la ostroj. Ja kiam ili sin fiksas multnombre sur ostraron, la kvanto da ŝlimo kiun ili forĵetas iom post iom tute kovras la ostrojn tiam pereontaj rapide.

Sed ĉio tio ne tro malgajige impresu vin, kaj dum la monatoj kun R la ostroj forsavitaj de ĉiaj malamikoj alvenu al via tablo... kie ve! ili ne havos pli bonan sorton!

Lucien BELHOSTE

UNE OPINION

L'ESPERANTO représente l'un des efforts les plus vivants et les plus viables en vue de faciliter les échanges de connaissances et d'idées scientifiques et culturelles sur un plan vraiment international.

Je vois en lui une amorce naturelle et un point d' appui précieux pour une meilleure compréhension, prélude à une entente entre tous les peuples du monde, sans distinction de nationalités, de races, de couleurs ou de religions.

Le développement prodigieux des moyens de communications permet de se rendre en quelques heures d'un point à un autre du globe. De hardis cosmonautes se préparent à la conquête du système solaire. Les temps ne sont-ils pas venus pour les Hommes, de reconnaître qu' ils appartiennent à une seule patrie, la planète TERRE, sur laquelle ils finiront bien par parler une seule et même langue.

F. de LIONNAIS
Président de
l'Association des
Ecrivains Scientifiques de France

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

FOIRE DE PARIS 1963

L'activité déployée par Mme BODARD pour l'organisation de notre stand à la Foire de Paris avait permis un arrangement très décoratif et plaisant pour le public. C' est ce qu' a voulu fixer, sur la photo ci-contre, notre ami SABATIER, membre du conseil de la Fédération Parisienne. On reconnait notamment Mmes SABATIER et FAYOT.

POR DESEGNI LA VERDAN STELON SEN CIRKELO



1- Desegni la linion BC kun ĝia mezo en M.
Desegni la perpendikularan linion MA, kies longeco estas trifoje MC (MA = MC x 3) (°)

2- Kunigi BA kaj AC

3- Duone desegni la horizontalan linion DAE, tiamaniere ke:
AD = AE = AB = AC

4- Kunigi BE kaj CD, sed nur plene desegni BH (sur BE) = AB, kaj CG (sur CD) = AB.

5- Fine kunigi GH.

(°) Fakte estas malgrandeta diferenco, kiu tute praktike ne gravas, ĉar la ĝusta solvo postulas:
MA = 3,07768 x MC

Elpenso de R.DEMOLIENS, 34 rue P. Lamandé - HOUILLES - (Seine - et - Oise)
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx
Le Gérant: Jean GUILLAUME - L'Imprimeur: S.I.T.E.C. 188 Fbg St-Denis (Xème)

VIVO DE LA GRUPOJ

CHATEAUMEILLANT (Cher) - La ĵus kreita klubo "Juna Rozo" prezentis la 1-an de septembro, dum granda festparado sian propran ĉaron "Esperanto, ŝlosilo por pli bona mondo". Pli ol 200 personoj ĉeestis.

GRENOBLE - La lasta jaro estis tiu de la revekiĝo.8 esperanto-kursoj okazas en tiu urbo. Vojaĝo al Nederlando sukcesis kaj pluraj amoj restadis en Primoŝten. Sin turni por informoj al S-ro DETTWILLER, 4 avenue Albert-Ier de Belgique.

L Y O N - Dum la kunveno de la 16/6, la grupanoj aŭdis raporton pri la Nacia Kongreso, en Perpignan, kaj ankaŭ sonbendon pri Japanujo. Je la fino de la kunveno estis disdonitaj la diplomoj de "Atesto pri Lernado" (13), "Atesto pri Supera Lernado" (4), kaj "Atesto pri Kapableco (1). Gratulojn al la sukcesintoj kaj ankaŭ al la kursgvidantoj.

MONTELIMAR - En venonta oktobro oni inaŭguros Zamenhof-st. Dum la pasinta jaro du kursoj, okazis kaj estis aranĝita kinvespero

Responde al la alvoko aperinta en nia revuo, la grupo sendis 680 F. al la grupo en Sabadell (Hispanujo) kie oni suferis pro gravaj inundoj.

La grupo helpis la naskiĝon de nova grupo en la apuda urbo BOLLENE.

SAINT-ETIENNE - Ĉiu marde la 20 membroj de la grupo kunvenas kaj esperas post ioma stagnado alveni al pli granda aktiveco.

VIENNE - La grupanoj estas agemaj, partoprenas la esperanto-eventojn, akceptas alilandajn samideanojn, propagandas en la "Klubo de Unesko", kie malfermiĝis kurso, kaj ankaŭ en la "Union Chrétienne des Jeunes Gens" kie okazos kurso venontjare. La grupo kunvenas dufoje po monate, kaj omaĝis al Dro Privat.

EL LA REVUOJ

BUDHANA KURIERO (n°9-julio 1963) kun interesa artikolo pri "Eŭtanazio".

SONORILO (n°3-jun.jul.1963) raportas detale pri la jara kongreso de Belga Esperanto Federacio en Antverpeno.

POLA ESPERANTISTO (n°2-marto-aprilo 1963) ĉefartikolo pri la sinteno de la Eklezio rilate al la latino kiel internacia lingvo. Filatela rubriko en kiu estas mankoj, ĉar ĝi ne mencias la du stampojn uzitajn de la franca poŝto okaze de la 54-a Nacia Kongreso, en Baugé kaj la 31-a Normanda Kongreso en Rouen dum 1962.

NORDA PRISMO (n°3/1963)- Baldaŭ dekjara revuo literatura, kun la kutima riĉa enhavo. Post la malapero de la Nica Revuo estas nun nepra devo de la esperantistoj subteni tiun tre interesoplenan revuon (jarabono I3 F ĉe U.F.E.)

INFORMA BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO DE PRAHA - (n°2 marto-majo 1963) pli speciale dediĉita al Norda Vjetnamio, en kiu oni legas interalie ke Ĉekoslovakio konstruis donace modernan malsanulejon en Haĭ-Phong.

EDUKADO INTERNACIA (n°66-27.6.I963) sub formo de plurpaĝa bulteno estas la oficiala organo de I.L.E.I. Interesaj informoj pri la laboro farota dum la 48-a U.K.

LA FERVOJISTO (n°I85-julio 1963). En ĉiu numero de la organo de la franca IFEF-sekcio oni povas legi interesan fakan artikolon krom la kutimaj rubrikoj kaj raportoj pri la vivo de la asocio.

oooxoooxoooxo

DANSK ESPERANTO BLAD (n°6/7 Junio - julio 1963) sub malgranda formato enhavas multon pri la dana jarkongreso en Kolding, kun multaj malgrandaj fotoj.

NORVEGA ESPERANTISTO (n°5/6 - 1963) aperigis sub la subskribo de L.K.H. interesan artikolon pri "Jean ALLUM" norvego, kiu naskiĝis en Francujo (1880-1928), lernis en Hereford, en Anglujo, militservis en Norvegujo (1902), edziĝis (1906) al francino, Andrée LEROY (1887-). Li fariĝis esperantisto ĉ. 1900 kaj partoprenis la Unuan Kongreson, kie li eĉ ludis rolon (140 vortoj) en la komedio de Molière "Edziĝo kontraŭvola".

DIA REGNO (n°7/8 julio - aŭg. 1963) detalis la programon de la 16a kongreso de K.E.L.I. okazonta en Graz (25/7-1/8) agrabla halto survoje al la 48-a U.K. en Sofio.

J-A. R.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Niaj geamikoj Eliane PARMAIN kaj Michel ROBERT geedziĝis la 27-an de Jlio 1963, kaj uzis la 48-an U. K. en Sofio kiel geedzan vojaĝon.
Niajn korajn gratulojn al ambaŭ.

==========

NGUYEN-DO-KHANK, 98 NG - DU 98, Hanoj (Vjetnamio) desegnisto 32 jara kolektadas esperantaĵojn: gazetojn, revuojn, fotojn de Esp. movado kaj bildojn de Parizo. Sendos reciproke.

S-ro Katona LAJOS, 25-jara instruisto, serĉas korespondanton pri filatelo, poŝtmark-kolektadon kaj ankaŭ lernejon kie oni interesiĝas pri tiu temo. (Adreso: Kossuth 36/B - KISDOM BEGYHAZ (Hungarujo)

S-ro Mihail KALAIDJIEV, selo Debočica BLAGOEVGRADSKI OKR (Bulgarujo) deziras korespondi pri junulara vivo.

RECENZO

LA PAPALAGOJ - Paroladoj de oceania tribestro, publiki gitaj de Erich SCHEURMANN - traduko de G. FAULHABER - 80 paĝoj - poŝformato - Komune eldonita de S.A.T kaj F.L.E.

La indiĝenoj d e Samoa - Insuloj nomas la blankulojn "la papalagoj". Unu el tiuj ĉi indiĝenoj, klera tribestro, iam vojaĝis tra Eŭropo, kaj nun li rakontas al siaj tribanoj la vivon, la kutimojn, la pensmanieron de "la papalagoj" en iliaj propraj landoj. La observoj de ĉitiu parolanto estas amuzaj, humorplenaj, ŝajne naivaj, sed, fakte, trafaj kaj eĉ filozofiplenaj. Ĉitie la blankula civilazacio estas juĝita de oceania indiĝeno! Leginte ĉi tiun verkon, oni tute ne fieras esti papalago!

Ĉi tiu tre interesa libro, la unua el planita serio, plaĉos al multaj legantoj kaj ni esperas ke la sekvantaj poŝlibroj de tiu serio anoncitaj de SAT kaj FLE estos tiel bonaj kiel ĉi tiu.

L E G R E E

nnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnn

N E K R O L O G O

Ni havas la doloron informi vin pri la forpaso de S-ino MARLY, edzino de nia amiko MARLY el Bordeaux,

kaj p r i la akcidenta morto de LUC GUILLAUME, 17-jara filo de niaj geamikoj Jean kaj Julia GUILLAUME.

Ni petas ilin ĉiujn akcepti l a sinceran esprimon de niaj kortuŝaj kondolencoj kaj sentoj.

SERVICE DE LIBRAIRIE

ETUDE et ENSEIGNEMENT

L'Espéranto, cet Inconnu..... 1,25
Espéranto-Manuel (Chavet-Warn) 5,oo
Ni parolu en Esperanto..... 4,80
Ludoviko en Nederlando..... 11,oo
Esperanto, fil;d'Ariane..... 12,50
Plena Gramatiko (vol. 1)..... 12,oc
Lingvo kaj Vivo (Waringhien).. 20,oo
Esperanta Proverbaro (Zamenhof) 7,50

DICTIONNAIRES

Léger-Albault (F + E)..... 20,50
Waringhien (E + F) 30,oo
Lexique Léger (E + F) 5,40
Naùlingva leksikono (Bastien). 10,oo
Plena Vortaro de Esp° 15,oo
Vocabulaire de poche (Bastien) 3,oo

HISTOIRE du MOUVEMENT

Le Docteur Espéranto 6.50
La Esperanto Movado 3,oo
La Internacia Lingvo (Lapenna) 8,50
Leteroj de Zamenhof (2 vol.).. 20,oo
Originala Verkaro (Z.) 18,oo
Vivo de Zamenhof (Privat) 4,50
Historio de la Lingvo Esp°.... 8,50
Doktoro Zamenhof.....(bindi. 15,oo

LITTERATURE

Angla Antologio..... 14,oo
Akbar (Brouwer)..... 5,50
Aventuroj de Marteno Drake.... 4,50
Brulanta Sekreto..... 3,30
Fabiola..... 7,50
Ĝoja Podio.....(Schwartz). 4,50
Les Héros existentialistes.... 2,oo
Infanoj en Torento (2 vol.)... 5,60
Invito al ĉielo..... 4,50
Malsata ŝtono (Tagore)..... 15,oo
Miru, Pensu, Ridu 9,oo
La Naùzo (Sartre/Bernard)..... 20,oo
Normandaj Rakontoj..... 17,oo
Princino de Marso..... 1,70
La Revizoro (Gogol)..... 4,50
Taglibro de Anne Frank..... 11,50
Topaze - ŝipego "Tenacity".... 10,oo
Reĝo Edipo, Antigono..... 10,oo
Fabeloj de Andersen 4a vol. .. 15,oo
Tartarin de Tarascono..... 7,oo
La Verda Raketo (Forge)..... 11,25
La Virineto en Bluo..... 3,30
Vitralo (John Francis)..... 6,oo
Eroj (M.Boulton)..... I2,50
Esperanta Antologio..... 18,50
Dana Antologio..... 16,50
La Floroj de l'Malbono..... 13,50
Kontralte (M.Boulton)..... 10,oo
Peer Gynt (Ibsen)..... 11,20
Sonĝe sub Pomarbo (Baghy).... 10,oo
Quo Vadis (trad. lyd.Zamenhof 14,oo
La Marvirineto (Andersen).... 10,50
Bildlibro pri Bestoj..... 11,50
Sekretoj de la Marestaĵoj.... 7,oo
Kiel akvo de l'rivero..... I5,oo
bindita.... 19,oo

RELIGION et PHILOSOPHIE

Tio, kion mi kredas (Rostand) 3,oo
Maksimoj de la;Rochefoucauld. 2,oo
La Nova Testamento..... 3,oo
La Sankta Biblio..... 10,oo
La Vivo de N.S.Jesuo (Dickens 5,oo

GEOGRAPHIE et VOYAGES

Aùstralio, lando k. popolo... 3,50
Ekspedicio Kon - Tiki..... 18,50
Kanako el Nananam..... 11,oo
Nepalo malfermas la pordon... 15,oo
Pariza gvidlibro ilustrita... 3,oo
De Parizo al Lazura Marbordo. 1,oo
Sipestro rakontas..... 8,50
Tempesto super Akonkagvo..... 11,oo

ARTS SCIENCES TECHNIQUES

Atakoj kontraù ĝardenplantoj. 15,50
Retoriko (I.Lapenna) bindita. 16,50
Vivo de la Plantoj..... 11,50
Amuzo per scienco..... 6,oo

DISCQUES

Cours complet (6 disques plus
(7 livrets..... 80,oo

Frais d'expédition et de poste:
20% jusqu'à 10 F.-15% jusqu'à 20 Fr. et 10% au - dessus. Les commandes sont à adresser avec les fonds à: U.F.E. 34 rue de Chabrol - PARIS IO°
C.C.P.PARIS 855-35

UNIVERSITY LIBRARY